

Aprila vespero

Programo en la Esperantista klubo Brno, prezentita de Junularo Brno en la kluba kunveno la 26-an de aprilo 1955, en saloneto de la hotelo Passage (nun Slovan).

La programon kompilis Josef Cink, Marta Lorkova kaj Jan Werner, la laste nomita verkis la enkondukan poemon.

En la programo rolis: Hana Bachtíková (H.B.), Jana Borkovcová (J.B.), Josef Cink (J.C.), Františka Fojtíková (F.F.), Oldřich Kaláb (O.K.), Věra Kořínková (V.K.), Marta Lorková (M.L.), Jaroslava Novotná (J.N.), Věra Podhradská (V.P.), Jarmila Rybová (J.R.), Milada Vondroušková (M.V.), Jan Werner (J.W.).

J.B. (Aprila bonvenigo): Bonvenon! Jes, bonvenon, via moŝto!
Bonvenon, kara sinjorin'!
Nun je via san' kaj gajo sonu tosto,
eĉ se mankas al ni hela vin'!

Kaj ni volas per miela buŝo,
ne per vino aŭ velkanta flor'
tuj sindoni al retuŝo
de maljuna afliktita kor'.

Jen la kantoj, ŝercoj, dialogoj...
Ho - neniun ĝenu ajna tristo kaj koler'.
Tiujn igu forel viaj togoj!
Tie ĉi al nuboj mankas la toler'.

Ol la nuboj pli ŝatatas la diboĉo,
la senzorga, sed laŭnorma petolem',
kiu helpas vin forgesi pri krieta kaĉo
kuirita de edzino via mem.

Ĉe ni ĉiu manĝos sen dieto,
je frandaĵoj riĉas nia pot'
sed atentu, verda societo,
la aprilo tro abundas je la kot'.

En la koton eble vi nin pelos kure,
vi - ŝvebontoj en aprila tromp',
promesontaj ĵure,
ke nin trafu justa nuko-romp'.

Ĉio vana... Spitas nia rido... rido...
kaj ĝi baŭmas kvazaŭ mara plaŭd',
nevenkebla, drola leonido,
tre infekta, sendependa de aplaŭd'

Ĝoju kune, la enua sidantaro,
la kortegaj damoj kaj la kamaril',
sen vi tamen ne sukcesos Junularo
en programo de l' april'.

J.W.: ...en programo de 1^a april'. Jes, sen vi certe ne sukcesus nia Junularo. Nu, rigardante viajn malacidajn vizaĝojn, mi komencas esti kontenta. El viaj okuloj radias firma volo, volo ĝoji kun ni, jes, certe ĝoji... Ĉu mi estas sufiĉe sugesta? Diru, ke jes, ĉar poste ni povos konsoli nin per tio, ke en plena ĝojo vi ne rimarkis mankojn de la hodiaŭa vespero. Ĝi estas nur afabla mensogo. Aŭ vi opinias, ke tia afabla mensogo estus nigra makulo sur via animo? Ho, tute ne! Pardonu al mi, mi akre protestas, vi malpravas. Afabla mensogo estas grava faktoro de la mondpaco kaj ni devas ĝin toleri. Ni montros al vi, kia situacio ekestas, se homoj parolas veron. Jes, ni montros. - Jen loĝejo de profesoro Pretorius. Li kaj lia edzino invitis al koktelo kelkajn konatojn. Inter ili estas doktoro Aleksandro kun la edzino, la geedzoj Gross, la ĥemiisto doktoro inĝeniero Malmann, la duonjuna sinjorino de Tolnaj kaj fine ŝia duonjuna nevino Irena: Pri **afabla mensogo**

S-ino Pretorius: Gesinjoraj moŝtoj, mia edzo ankoraŭ troviĝas en la laboratorio, sed baldaŭ li ĉeestos. Intertempe bonvolu kontentiĝi je mia gastigado kaj trinki specialan koktelon. Mia edzo mem eltrovis la recepton. Ĝi laŭdire efikas ege instige kaj korfreŝige. Sanon!

S-ro Malmann: (levante sian glason kaj riverencante al la sinjorinoj) Ĉu korfreŝige? Ĉu la koro povos ankoraŭ elteni tion, kiam ĝi jam estas freŝigata per la aspekto de tiaj ĉarmaj virinoj?

S-ino Gross: Amindumulo!

D-ro Aleksandro: Kiam li estas prava, li estas prava. Krome, li povas tion diri sentime, ĉar li ja estas fraŭlo!

S-ino deTolnaj: Ankaŭ li iam estos sub jugo de de ĉarma pantofleto. Kiel maljuna virino mi povas tion trankvile...

S-ino Aleksandro: Nu-nu-nu - ne koketumu per via aĝo. Vi hodiaŭ aspektas preskaŭ tiel june kaj freŝe kiel via ĉarma nevino.

F-ino Irena: Ho ve, atentu - mi, havante dudek kvin jarojn, sentas min jam maljuna.

S-ro Malmann: Ho, Dio, kia bebo, en tiu aĝo mi ankoraŭ suĉis mian dikfingron.

S-ro Gross: Ĉar ni jam venis al komplimentoj, permesu diri pri nia vere ĉarma gastigantino, ke ŝi hodiaŭ aspektas kiel junulino. Kaj koncerne la koktelon, ĝi havas mian plej altan aprobon, ĝi gustas vere originale. Sanon al la belaj virinoj...

S-ino Pretorius: Mi ĉiam ĝojas, kiam estas ĉirkaŭ mi tiel agrablaj homoj... (dum ŝi plenigas la glasojn) ho, nun fine venas mia edzo...

La profesoro aperas en la pordokadro, ridetas kaj salutas la gastojn.

D-ro Aleksandro: Lastatempe pri vi aŭdeblas diversaj famdiroj, profesoro, laŭdire vi en via venenkuirejo mikse preparas tute grandiozan aferon.

Prof. Pretorius: Dirajoj, sinjoro kolego, nuraj babilaĵoj. Certe, mi laboras super la afero, sed ĝi troviĝas ankoraŭ en provstadio, en infanŝuoj, por tiel diri. Cetere, kiel gustis al vi la koktelo?

S-ro Gross: Bonege - ĉu estas eble ricevi ankoraŭ unu de la sama marko?

Prof. Pretorius: Bedaŭrinde jam ne de tiu ĉi, sed mi havas ankoraŭ sufiĉe da aliaj specoj.

Irena: Dankon al Dio, estis ja terura fluidaĉo!

S-ino de Tolnaj: Sed Irena, tion oni povas pensi, sed ne diri. - Mi cetere neniam kuraĝus prezenti al miaj gastoj tian aĉaĵon.

S-ino Gross: Aliflanke, tio estas komprenebla. Ankaŭ mi ŝparas prefere je la gastoj ol je mi mem.

D-ro Aleksandro: Certe, certe! Sed mi vetas, ke nia profesoro miksis la koktelon en sia laborejo el kruda alkoholo. Tio tute konformas al lia famo de ĉarlatano, kiun li ĝuas en la fakulaj rondoj.

Prof. Pretorius: (preskaŭ saltante pro ĝojo) Bonege!

S-ro Malmann: Dank' al Dio, nun la afero fariĝas pli amuza - mi jam ĝismorte enuis en tiu ĉi muzeo.

Irena: Tion mi rimarkas. Via aspekto incitas la plej piajn spiritojn al konvulsia oscedado. Jam duonhoron mi provas flirti kun vi, sed laŭŝajne eĉ por tio vi estas tro stulta.

S-ro Malmann: Eble ankaŭ tio ĝustas, kaj krome mi trovas nenion interesan je vi, escepte de viaj fiŝ-okuloj. Cetere, oni min avertis, ke vi estas rabia pri edziniĝo.

S-ino Gross: Paniko antaŭ pordofermiĝo. Nome, la ĉiama bubino efektive havas jarojn tridek du.

S-ino de Tolnaj: Preskaŭ ĝuste - kaj ŝi ĝis nun nur trifoje fianĉiniĝis. Laŭ la "leĝo de serio" finfine unu ja devos gluiĝi.

Irena: (al sinjorino Gross) Ne kredu, sinjorino moŝto, ke tio estas mia kulpo. Tiom longe, dum mi ne havos tian papagan kolon kiel vi, ankoraŭ restas al mi ŝanco. Bedaŭrinde ekzistas nur tre lacaj viroj aŭ tiel afektaj idiotoj, kiel nia kara sinjoro Malmann. (al la dommastrino) Mi volonte scius, kio siatempe instigis vian edzon al vi edziĝi?

S-ro Gross: Ankaŭ mi dezirus tion scii.

S-ino Aleksandro: Nu, ŝi ja estis kuiristino ĉe li!

S-ino Pretorius: Do, mi edziniĝis al mia edzo pro amo - kaj krome tiutempe mi ne havis iun alian kaj... mi volis malhelpi, ke mia malbona amikino akiru lin. Pro tio mi anstataŭ ŝi iris al rendevuo... Sed la maljuna azeno jam tiam estis tiel mens-fora, ke li tion tute ne rimarkis...

Prof. Pretorius: (rigardante sian horloĝon) Hm - vere la efiko devus esti tuj pasinta.

S-ino Pretorius: (oscedante) Kion signifas efiko? - Espereble ili baldaŭ foriros, alie ankaŭ la lastaj sandviĉoj estos for. Sinjorino de Tolnaj jam ses el ili formanĝegis. Kiam mi rigardas ŝin, ĉiam ŝi memorigas al mi porkidon en la montrofenestro de la buĉisto. Mankas nur la petroselo post la orelo.

Embarasa paŭzeto.

Prof. Pretorius: Sanon!

S-ino Pretorius: Sanon, karaj geamikoj!

S-ro Gross: Neniu scias tiel bonege miksi kiel vi, profesoro!

S-ino Gross: Belega posttagmezo!

S-ino Pretorius: Prenu ankoraŭ la sandviĉojn, mi petas! Ĉu plian koktelon?

S-ino Aleksandro: Dankon, dankon! Nun ni devas iri, bedaŭrinde. La servistino atendas nin al la vespermanĝo.

S-ro Malmann: (flustras en la oreleon de Irena) Vi faris profundan impreson je mi, fraŭlina moŝto! La societo leviĝis.

D-ro Aleksandro: (ĉe la pordo) Ankoraŭ mi volis ion diri. - Jes, estas publika sekreto, ke vi laboras super ver-serumo. Ĉu mi rajtas demandi, kion vi ĝis nun atingis?

Prof. Pretorius: Ts-jes, mian ver-rimedon mi pretigis en pulvora formo, kaj - hm - elprovis antaŭ nelonge. La eksperimento povas esti konsiderata sukcesinta. Sed mia konscienco ankoraŭ ne solvis la problemon, ĉu mi rajtas riski la publikigon. Tuj, kiam homoj aplikas mian rimedon, ili perdas tion, kio estas la plej homa en ili: la kapablecon afable mensogi.

J.W.: Do, ĉu vi aŭdis? Profesoro Pretorius mem diris, ke homoj perdintaj kapablon afable mensogi, perdis tion, kio estas la plej homa en ili. ..

J.C.: Kuru for! Savu sin kiu povas! Fajro! La domo brulas!

J.W.: Kion vi diras? Fajro?

J.C.: Grandega!

J.W.: Kie?

J.C.: ...Nenie.

J.W.: Kaj kial vi min tiel timigas?

J.C.: Tio ja estis nur afabla mensogo. Kaj nun vi darfas havi bonan humoron, ĉar mi savis vin antaŭ morto en fajro. Imagu nur, se mi afable - parolus veron pri la incendio.

J.W.: Nu, amiko, eble mi havus bonan humoron, sed vi per via afabla mensogo ŝtelis al mi ŝancon eminentiĝi antaŭ la publiko. Mi tiel forte volus estingi fajron!

J.C.: Amiko, pli facilas estingi la soifon. Kaj eminentiĝi vi povas pagonte al mi unu bieron.

J.W.: Sinjoro, ne nomu min amiko, mi petas!

J.C.: Nu jen, kien venis via instruo pri afabla mensogo. Sed estu trankvila, mi al vi plu afable mensogos. Aŭskultu, mi al vi diros unu anekdoton:

Foje en gastejo sidis viro. Ĉar li havis nenion por trinki, li vokis la ĉefkelneron: „Mi deziras glason da biero kun anso en la maldekstra flanko, ĉar mi estas maldekstrulo.“

V.K.: Aŭskultu, mi al vi diros unu anekdoton:

Foje en gastejo sidis viro. Li mendis tomatan saŭcon kaj ŝmiris ĝin sur sian ĉapelon. Alpaŝis al li unu el mirigitaj gastoj kaj diris al li admone: „Sinjoro, vi ŝmiras vian ĉapelon per tomata saŭco!“ La sinjoro respondis: „Oh, pardonu, mi pensis, ke tio estas vakcinioj!“

M.V.: Aŭskultu, mi al vi diros unu anekdoton:

Foje en gastejo sidis viro. Li venis kun karoto en la orelo. La gastoj miregis. La venontan tagon venis la sama viro en la saman gastejon kun petroselo en la orelo. La gastoj miregis ankoraŭ pli. Unu el la gastoj alpaŝis kaj kaj diris: „Sinjoro, vi havas en la orelo petroselon!?“ kaj tiu respondis: „Jes, hodiaŭ oni karoton ne havis.“

V.P.: Aŭskultu, mi al vi diros unu anekdoton:

Foje en gastejo sidis viro. Li estis fremdulo kaj la manĝokarton en la por li fremda lingvo li ne komprenis. Tamen li deziris ion manĝi. Li do vokis kelneron kaj diris: „Alportu por mi eble tion ĉi!“ kaj montris riske nekomprenatajn vortojn. La kelnero respondis: „Mi ne povas servi, tio estas sinjoro ĉefkelnero.“

J.N.: Aŭskultu - mi ne diros al vi anekdoton, kompatindaj aŭskultintoj. Ĉesigu vian ekscitiĝon! Mi ne kulpas pri la trompaj ŝercoj, mi mem ja suferis ankaŭ. Por denove trovi spiritan ekvilibron, mi rekomendas transiri al iu temo pli prudenta. Eble vin interesus... Ĵus mi kaptis bonan ideon. Ni entreprenu, ni entreprenu... Ĉu vi konsentas? Ho, vi certe ne estas kontraŭ klerigo. Kaj ni klerigos vin. Nun prelegos **pri la fundamentaj elementoj de Esperanto** profesoro Meningito. (Laŭ R. Schwartz el „La Ĝoja Podio“.)

O.K.: Gesinjoroj! - Iun aŭ alian tagon ĉiu el vi fariĝos akademiano. Tiam ne estos senutile koni la plej kaŝitajn sekretojn de nia lingvo. Kaj tial mi decidis malkaŝi antaŭ vi tiujn mirindaĵojn. Bonvolu min sekvi!

Kompreneble ni komencos per la komenco, tio estas per la alfabeto.

Gesinjoroj! La Esperanta alfabeto estas stranga fenomeno. La plej sagacaj sciencistoj ne scias ekzakte, al kiu fako la alfabeto apartenas. Multaj kalkulas ĝin inter la legomoj. - Ili pretendas, ke ĝi estas el mia familio de la betoj, kiel cetere ĝia nomo atestas: alfa beto. - Aŭ ili pedante

Ni, kontraŭe, asertas, ke la alfabeto ne apartenas al la legomoj, sed al homoj, kiuj legas. Ĝi

apartenas al la... leg-homoj. Ĉu vi kaptis la nuancon?

Lastatempe oni renkontis ankaŭ modernajn filologojn, kiuj klasifikas la alfabeton inter la meblaro. Laŭ ili la alfabeto estas meblo, ĉar ĝi estas lito konsistanta el 28 lit-eroj.

Ĝi estas tuta meblaro, ĉar, efektive, per simpla kunmeto de diversaj literoj oni konstruas plej diversajn meblojn. Ekzemple: K-m-d = komodo; s-f = sofo ktp. Tiu klasifiko ŝajnas akceptebla.

El la dirita dudek ok literoj oni iom post iom kunmetis vortojn, formis frazojn, produktis librojn. Estas preskaŭ nekredeble, kiom da volumoj oni sukcesis plenigi per tiuj kelkaj literoj.

Se oni metus unu sur la alian ĉiujn librojn ĝis nun verkitajn, oni havus turon miloble pli altan ol la Eiffel-turo kaj nur iom malpli altan ol la Babela. Kaj tiu turo, konsistanta nur el malmultaj literoj, fakte ekzistas. Oni nomas ĝin Litera Turo! Elĉerpinte tiel ĝisfunde la sekretojn de l' alfabeto, ni nun parolos pri la proksima paragrafo: la artikolo.

Estus insulto klarigi al vi, kio estas artikolo.

Artikoloj troviĝas en ĉiuj gazetoj. La plej mallongaj ĝenerale estas la plej bonaj. Tiurilate ankaŭ ni rememorigu saĝan konsilon de nia Fundamento, kiu bedaŭrinde ne estas sufiĉe atentata: „La personoj, por kiuj la fuŝado de artikolo prezentas malfacilaĵojn, povas en la unua tempo tute ĝin ne fuŝi.“ (Fund. § 1-a).

Kaj nun, gesinjoroj, antaŭ ol fini, ankoraŭ kelkajn vortojn pri la kazoj.

La kazoj estas la formoj de la deklinacio. Sed ne konkludu, ke „kazo“ estas sinonimo de „formo“. Neniu diru: „Tiu fraŭlino havas agrablajn kazojn.“ Ĉar kiam vi interesiĝas pri la formoj de fraŭlino, tio koncernas ne la kazon, sed... la kason! - Ĉu vi kaptis la nuancon?

En Esperanto ekzistas nur du kazoj: nominativo kaj akuzativo. Erare kelkaj soifuloj aldonas la „aperitivon“. La aperitivo ne estas kazo, sed nur okazo, jes, okazo por trinki. Kaj tiun ĉi okazon, gesinjoroj, mi volonte profitus...

J.C.: Ĉu vi aŭdis, Nikodemo? Ni vere ĝuis la prelegon. Ĝi estis vere tre bona, jes, tre bona... Neniam forgesu, kion vi ĵus aŭdis, Nikodemo. Neniam forgesu pri la kazoj, kiel la profesoro prelegis. Vi scias, akuzativo, nominativo, aperitivo. La plej malfacila estas akuzativo. Aŭskultu! Se mi diras „Ŝi amas sian kuzon“, la vorto „kuzon“ estas tipa ekzemplo de l' akuzativo. Ĉu vi komprenis?

J.W.: Certe, certe... jes, de la kuza tivo.

J.C.: Kaj en la frazo „Li kisas sian kuzinon“?

J.W.: Tipa ekzemplo de... la kuzina tivo!

J.C.: Idioto! A-kuza-ti-vo! A-ku-za-ti-vo!

J.W.: Jes, akuzoto. I-di-o-ti-vo! Oh! Pardonu!

J.C.: Ha, senespere! Kaj en la frazo „Li kaptis la banditon“, kio estas?

J.W.: Estas... estas detektivo!

J.C.: Azeno! Tipa ekzemplo de akuzativo!

J.R.: Jam sufiĉas! Se mi lasus vin daŭrigi laŭ la originalo de Raymond Schwartz, vi fine devus vin interbati kiel etaj buboj. - Kaj nun sekvas la kanto pri ranoj, *Žabáci*, tradukita de Jožka Cink.

J.C. kaj la ĥoro de ranoj:

1. Dum la ekbril' de hela lun' ekkantas ĉe akvuj' - la ranoj, kiuj al ekskurs' borden saltas tuj. - Tre-ege la muzikon ŝatas tiu rana gent' - kaj vere ĉiu rano estas la muzik-talent' - (Refreno) Rana viv' la plezur', um kva-kva-kva kva-kva-kva, esti en akvo nur, um kva-kva-kva kva-kva-kva, kanti sub verda kan', um kva-kva-kva kva-kva-kva, tia viv' logas tre ankaŭ min esti ran'.

2. Okazis foje ĉe la lag' de l' amo akcident' - ekcelis al alia in' ranjunula sent'. - Sed tiun aventuron sekvis tre feliĉa fin', ĉar forlasita ranfraŭlino akven ĵetis sin. (Refreno.)

J.W.: Hm, tiuj ranoj havas multe pli facilan Esperanton. Tiun kva-kva certe komprenus ĉiuj ĉeĥaj ranoj kaj ranetoj.

J.C.: Nu, Nikodemo, ne estu enviema. Virinoj ja ĉiam havas pli facilan vivon. Sed nun iom da gramatiko.

J.W.: Hi-hi-hi, ha-ha-ha! - Lasu min ridi!

J.C.: Nikodemo, kio al vi okazas?

J.W.: Gramatiko! Tio memorigas min pri mia lernantino, kiam mi estis instruisto en la Ĉe-universitato. Mi donis al ŝi privatajn lecionojn pri gramatiko. Ŝia patrino, severa persono, ĉiam sidis en la apuda ĉambro kaj aŭskultis tuj post la pordo. Foje mia lernantino ridis tro laŭte, kaj la patrino iom nerve demandis: „Ĉu estas la gramatiko, kiu ridigas vin?“ Kaj la filino respondis: „Jes, patrino, la sinjoro... gramatiklas min!“ -. -. -

H.B.: Permesu, mia tasko estas anonci novan programeron. Sed unue demando: Ĉu vi scias, kio estas hazardo? - Nu, diru, hazardo estas... se...

J.C.: ...se Nikodemo parolas saĝe.

J.W.: Malsaĝe! Ne gramatiklu min, vi, vi hazardulo!

H.B.: Ne! Ne! Plena Vortaro diras, ke „hazardo“ estas neantaŭvidebla ŝanco, prospera aŭ malprospera okazo.

J.W.: Ĉu denove ia kazo?

H.B.: O-ka-zo! Ekzemple renkontiĝo. Hazarda renkontiĝo. Tiel nomiĝas nun komenciĝonta renkontiĝo de du fanfaronuloj.

O.K.: Oooh, kia hazardo nin renkontigis. Sinjoro mi vin... ĉu vi min konas?

V.K.: Ne, sinjoro!

O.K.: Mi estas la plej sukcesa kaj la plej sperta ĉasisto en la mondo. Kaj vi?

V.K.: Mi estas la plej granda kaj la plej kuraĝa ĉasisto en la mondo, sinjoro!

O.K.: Oho, ho!

V.K.: Ja M' ham da haj, Mabaruka haj!

O.K.: Ĉu vi jam sukcesis kapti iun muson?

V.K.: Kompreneble! Musojn mi kaptas tiel, ke mi ilin enpelas sub la ŝrankon kaj poste mi forpafas la piedojn.

O.K.: Kia primitiveco! Kiam mi estas ĉasonta musojn, mi ilin enpelas en ĉambron kun fermitaj fenestroj, prenas vipon ka ĉirkaŭpelas ilin tiel longe, ĝis ili estas tute ŝvititaj. Poste mi malfermas la fenestrojn, musojn trafas malvarmumo kaj sekve pneŭmonio. Kapti ilin poste estas facile.

V.K.: Kaj kiel vi kaptas kulojn?

O.K.: Kulojn mi ĉasas tiel, ke mi ilin flugigas en subtegmenton kaj poste mi demetas la ŝtupetaron.

V.K.: Simile mi ĉasas papiliojn. Mi enpelas ilin en baritan ĝardeneton kaj tuj post ili fermas la pordeton.

O.K.: La plej modernan metodon mi uzas por ĉasado de elefantoj en dezerto. Mi tie kribras kaj kribras la sablon tiel longe, ĝis sur la kribrilo restas nur elefantoj.

V.K.: Mi havas rimarkindan metodon por ĉasado de leonoj. Kiam mi volas kapti unu leonon, mi

kaptas du kaj unun mi liberigas.

O.K.: Interese. Sed, ĉu vi hazarde ne imitas min ĉe la ĉasado de zebroj?

V.K.: Ĉu mi scias? En tiu kazo oni kutime gumviŝas la striojn kaj poste oni kaptas zebrojn same kiel ĉevalojn.

M.V.: La inventemo de tiuj du homoj estas vere rimarkinda, sed malpli kredinda. Interese, ke ili ankoraŭ ne pensis pri maniero, kiel ĉasadi homojn. Mi do licas konkludi, ke kanibaloj atingis multe pli altan ŝtupon ol niaj du ĉasistoj, ĉar kanibaloj ankaŭ tion ĉi praktikas, Ni havas eĉ dokumenton pri tio. Kompreneble, viktimo de kanibaloj estis neniu alia ol esperantisto.

Tomáš Pumpr: **Foirfesta kanto pri ĉe-instruisto kaj kanibaloj:**

Anoncanto (emfaze): Nun sekvas kanto
pri Esperanto
kaj Ĉe-instruisto.

Lin ja formanĝis
nigraj kanibaloj,
sed sin ne ŝanĝis
liaj idealoj.

(Foirfesta muziko: ludas akordiono.)

Kantisto: Vivis foje vir' en urbo Prago,
Sigismundo estis lia nom'.
Li dediĉis sin en unu tago
al la Esperanto-idiom'.

Li ellernis ĉiun vortradikon,
malgraŭ granda peno kaj klopod',
elparkeris Plenan Gramatikon
kaj aliĝis al la Ĉe-metod'.

Por dissemi ĉie novan senton
ne sufiĉis al li propra land'.
Li elektis nigran kontinenton
por grandskala verda propagand'!

Li pilgrimi devis sur kamelo
en dezerta sablo de Sahar',
ĝis li fine venis al la celo
en la indiĝena praarbar'.

Ho ve, kial la Fortun fatala
antaŭ morto ne avizis lin?
Ĉar sovaĝa gento kanibala
en la praarbar' surprizis lin.

Ili kaptis lin kaj en vilaĝon
trenis lin sur malfeliĉa voj'
kaj lin metis en bambuan kaĝon.
Estis vane plori: ho ve, oj!

Ili volis laŭ kutim' Afrika
kaj konata kanibala mor'
lin grasigi kaj lin nutri dika,
poste buĉi lin kaj manĝi for.

Tamen tion ili ne atentis,
ke ne manĝos la esperantist',
vane ili bongustaĵojn sendis,
li surprizis ilin perrezist'.

Tio estis tre-tre malagrabla,
ĉar pro larmoj kaj melankoli'
li maldika iĝis, iĝis magra,
kaj malgrasa iĝis en tali'.

La ĉefo de kanibaloj: „Kial viro, vi ne ĉesas larmi?“
Kantisto: Lin demandis la ĉefkanibal'.

La Esperanto-instruisto: „Ĉar ne povis realiĝi al mi
mia Esperanto-ideal'.
Mi ne timis tra la maro vadi
por alveni fine al la cel':
Esperranton instruadi
kaj vin varbi por la Verda Stel'.“

La ĉefo de kanibaloj: „Nu atendu iom en la kaĝo.“
Kantisto: Petis lin la kanibala ĉef.

La ĉefo de kanibaloj: „Ke ne estu vana la vojaĝo,
realiĝos via vivo-rev'.“

Kantisto: Kaj nun ĉio sin komencis ŝanĝi,
ĉesis larmoj, ĉesis „Ve, ho ve!“,
ĉar li rajtis kurson ekaranĝi
laŭ metodo de Andreo Ĉe.

La kursanoj: „Elegante, forte kun kuraĝo,
elegante, forte kun kuraĝo...“

Kantisto: Elegante, forte kun kuraĝo
lernis tuta kanibala gent'.
Instruisto sidis en la kaĝo
kaj instruis kun temperament'.

Lia klaso montris sin talenta,
kaj li post la deka lecion'
estis dika, estis korpulenta
kaj rondforma kiel la melon'.

(Paŭzeto - kelkaj taktoj de muziko)

La Esperanto-instruisto: „Mi deziras bonan apetiton...“
Kantisto: Estis lia adiaŭa fraz'...

Kaj ili komencis sian riton,
preparante spicon por kolbas'.
Tia estis lasta leciono,
tia estis lia vivo-fin'...

Ili lin kuiris en kaldrono
kaj distranĉis kaj formanĝis lin.

Ĥoro: Lian koron ili semis plante
laŭ la pet' de lia testament',
kaj ĉirkaŭe kantis Esperante
pri frateco kaj pri nova sent',

(Kelkaj taktoj de muziko kaj fino.)

F.F.: Kvankam la aŭtoro prisilentis tion, mi rajtas diri, ke la Ĉe-instruisto ĉion eltenis, la flamoj ne tuŝis lin, ĉar li estis honesta viro. La kanibaloj vidante la miraklon. adoris lin kiel sian dion. Jen vi havas okazon vidi lin dum li ekzamenas la ĉefon de kanibaloj (libere laŭ R. Schwartz: **Tipa ekzemplo**):

J.C.: Nikodemo, vi konas nian Fundamenton, ĉu ne? Kiom da ĉefaj partoj ĝi havas?

J.W.: Du!

J.C.: Ĝuste, kaj tiuj du estas?

J.W.: ...La unua kaj la dua.

J.C.: Stulte! Nikodemo, memoru: La du ĉefaj partoj de la Fundamento estas: la Fundo kaj la Mento. Kion vi scias pri la Fundo?

J.W.: La Fundo estas... la fundo... de l' mizero,

J.C.: Ĉu eble? Kaj kion vi scias pri la Mento?

J.W.: Lamento... lamentado... la plej konata estas tiu de Jeremio.

J.C.: Nikodemo, denove stulte!

V.P.: Permesu, kara instruisto!

J.N.: Ne koleru, kara publiko!

V.P.: Ni nun havas por vi taskon, ege malfacilan enigmon. La objekto estas 25 metrojn longa, blanka kaj kuŝas sur la herbo en ĝardeno. Kio ĝi estas?... Blanka fadeno!

J.N.: Tia enigmo! Mi havas pli bonan. La objekto estas 25 metrojn longa, nigra kaj estas sur la herbo en la ĝardeno. Kio ĝi estas?... Nu, ombro de la fadeno!

V.P.: Tiajn bubajn enigmojn vi povas lasi por vi. Mia nova enigmo estas pli inteligenta: La objekto estas blanka, bone atentu, ĝi estas blanka, pendas sur muro kaj oni uzas ĝin por viŝi la manojn... Haringo!

Nu, haringo! Ĉu vi miras? Tio estas simpla. Blanka ĝi ne estas, sed oni povas ĝin blanke farbi. Sur muro ĝi ne pendas, sed oni ĝin povas tien pendigi. Kaj la manoj? Nu, la manojn vi finfine ne viŝu en ĝi.

J.N.: Tion vi nomas inteligenta? Mi ne estos tiel kruda al la publiko, Aŭskultu min. Se vi divenos mian enigmon, pri via saĝeco neniu dubos: La objekto estas verda, longa du metrojn, larĝa unu metron kaj alta 70 centimetrojn. La objekto kuŝas sur la vojo. Kio ĝi estas? ... Kesto speciale por tiu ĉi enigmo fabrikita kaj sur la vojon metita.

J.R.: Sidu trankvile, mi petas. Ne sendu fulmojn al niaj kapoj.

M.V.: Bonvolu ne invadi nian scenejon!

J.R.: Pst! Silentu, nia eta bubo Miloĉjo solvas la problemon ekdormi, dum pena asistado de lia paĉjo. Pst! - **Miloĉjo iras dormi**

O. K.(paĉjo), LV. (Miloĉjo).

M.: Paĉjo!

P. : Kion vi deziras, mia filo?

M.: Mi ne povas ekdormi.

P.: Ĉu vere? Vi ekdormos, nur kalkulu ĝis mil.

M.: (Iras en sian ĉambron) Unu - du - tri - kvar -

P.: Ne laŭte, vi devas kalkuli enmense.

M.: Kio estas „enmense“?

P.: Nu, vi devas kalkuli senvoĉe.

M.: Sed tiel vi tion ne aŭdos.

P.: Eĥ, bubo, mi ja tion ne volas aŭdi.

M.: Kial mi do devas kalkuli?

P.: Por ke vi ekdormu!

M.: Sed kiam mi ekdormos, mi ne povos kalkuli ĝis mil!

P.: Vi ja ne devas...

M.: (Reveninte en la ĉambron) Paĉjo!

P.: Nu?

M.: Rakontu al mi fabelon, por ke mi povu endormiĝi.

P.: Bone, aŭskultu! - Foje estis maljuna karbigisto...

M. Kion signifas karbigisto, paĉjo?

P.: Karbigisto estas viro, kiu bruligas lignan karbon.

M.: Kial la karbigisto ne kuiras per gaso, paĉjo?

P.: Sensencaĵo! La karbigisto bruligas lignan karbon en karbigota ligno-stako kaj poste li vendas ĝin.

M.: Tia akaparulo!

P.: Kia akaparulo?

M.: Nu, karbon, kiun li mem bruligis, li ne rajtas plu vendadi!

P.: Tion vi ne komprenas, Miloĉjo. Kaj fine, tio ne gravas. Tute certe tiu malriĉa karbigisto vivis meze de densa arbaro kaj havis filon, kiu nomiĝis Ciprian.

M.: Ĉu li estis ĉe filmo?

P.: Kial ĉe filmo?

M.: Ĉar li havis tian strangan nomon.

P.: Tio ne estas vero! Ĉiuj homoj tiam donadis al siaj filoj tiajn nomojn - ili havis senton por poezio. Ili ne estis tiaj stultkapuloj, kiaj ofte estas hodiaŭ.

M.: Kaj paĉjo, kian kapon havas homo, kiu donas al sia filo la nomon Miloĉjo?

P.: Vi estas stultulo! - mi devas al vi diri! Tenu fine la buŝon kaj aŭskultu! - Do, la karbigisto vivis kun Ciprian en la densa arbaro. Li bruligadis lignan karbon kaj dum longaj semajnoj li nenion vidis.

M.: Arbaro ja ne estas komerca kvartalo, paĉjo. Ĉu tiu karbigisto ne povis al si prizorgi vendejon sur la ĉefplaco en Brno?

P.: Tiam tie estis ankaŭ praarbaro kaj en ĝi vivis nur sovaĝaj bestoj.

M.: Tio estis bonega - oni pafadis tie senĉese, ĉu?

P.: Miloĉjo, ne interrompu min konstante! - Iun tagon Ciprian ekdeziris vojaĝi. Do, li ekiris rekte post sia nazo. Nu - memkomprene - kiam tie staris arbo, li devis ĝin ĉirkaŭiri...

M.: Nur trankvile daŭrigu, mi nenion diras, paĉjo!

P.: Subite Ciprian haltis kiel ŝtoniĝinta. Li ekaŭdis akran sonon, kiu lin terurigis.

M.: Nu, kompreneble - timemulo!

P.: La sono eliĝis el la gorĝo de belega junulino, kiun tenis terura ogro je haroj. Ciprian staris tie senvorte kaj meditis, kion fari.

M.: Ĉu li ne povis iri al telefono kaj voki policon?

P.: Tiam ankoraŭ ne estis io simila. Krome ne estis tempo, ĉar la ogro svingis per longa glavo kaj minacis, ke li forhakos la kapon de la junulino. Ciprian subite rememoris, ke li havas en la poŝo ŝtonĵetilon.

M.: Vidu, paĉjo, tio estas bona kaj utila objekto kaj vi ĝin de mi ĉiam forprenas.

P.: Ĉar vi disrompus ĉiujn fenestrojn. La kuireja fenestro estas rompita, la kristala vazo en la salono estas krevita kaj la busto de Svatopluk Ĉech...

M.: Tio estas komika fabelo, ĉu, paĉjo?

P.: Vi kulpas pri tio, ke mi senĉese perdas la fadenon. Kial vi ne silentas? - Ciprian do enmetis ŝtonon en la ĵetilon, atente alcelis kaj elpafis. Li trafis la ogron en la manon. Tial la glavo ŝanĝis sian direkton kaj anstataŭ forhaki la kapon ĝi forhakis nur la belegan harplekton de la junulino. La ogro falis senkonscie al la tero.

M.: Tio estis bela ogro, paĉjo!

P.: Tenu la buŝon kaj aŭskultu, aŭ mi kapofrapos vin. - La ogro kuŝis senkonscia.

M.: Eble li mortis pro apopleksio, paĉjo.

P.: Tio eblas. - Li kuŝis senkonscia kaj kaj...

M.: Aŭ la ŝtono trafis lin en tempion?

P.: Ne, ĝi trafis lin en la manon.

M.: Aŭ en la mentonon?

P.: En la manon ĝi batis lin, ĉu vi komprenis?

M.: Sed, paĉjo, pro tio li ja ne estus senkonscia!

P.: Miloŝo, mi diros al vi ion. Se vi tuj ne ĉesigos viajn stultajn rimarkojn, mi frapos vin, ke via kapo flugos for. Memoru tion! - Kiam kuŝis la ogro senkonscia kaj Ciprian alproksimiĝis, la junulino lin superŝutis per insultoj: „Monstro“, ŝi diris, „kion vi faris? Mi estas reĝino de koboldoj. Viakulpe mi estas prirabita pri mia plej bela juvelo, pri miaj haroj. Kiel puno...

M.: Paĉjo!

P.: Kion vi denove volas?

M.: Dormi.

P.: Dormi?

M.: Jes.

P.: Mi ne bedaŭros - iru dormi. Bonan nokton!

M.: Bonan nokton, paĉjo!

P.: Bonan nokton, Miloŝo.

Miloĉjo malaperas en sia ĉambro.

P.: (Ĝemas) Dank' al Dio, ke mi liberigis min de li. Ankoraŭ unu minuto kaj mi freneziĝus.

Paĉjo eksilentas. La pordo denove malfermiĝas. Miloĉjo elŝovas la kapon el inter la pordo.

M.: Paĉjo!

P.: Kion vi volas?

M.: Mi opinias nur - ne rakontu al mi pri tiaj aferoj, ke reĝino de koboldoj insultis Ciprianon pro la tonditaj haroj. Ŝi ja ĝojis, ke ŝi seniĝis de ili kaj ke ŝi fine povas fari al si modernan frizaĵon.

0-0-0

J.C.: Nikodemo, jam venu! Miloĉjo jam dormas kaj sinjoro paĉjo iris ankaŭ dormi... Ĉu mi ĝisatendos vin?

J.W.: Pardonu, sinjoro instruisto, ke mi venas tiom malfrue, sed mi devis melki ĉiujn bovojn de nia kolĥozo.

J.C.: Bone, bone! Sidiĝu jam. Komence de nia hodiaŭa leciono iom da ripetado. Nikodemo, ĉu estas permesate fari ŝanĝojn en nia Fundamento?

J.W. Jes.

J.C.: Kiel jes? Ha? Ekzemple?

J.W.: Ekzemple, post la Gramatiko venas la Ekzercaro, sed en la rusaj eldonoj tiu ĉi parto nun nomiĝas Ekzero.

J.C.: Ekzero? Kial? Kion vi fabelas?

J.W.: Ĉar rusoj forigis la caron!

J.C.: Jen, jen! Vi estas pli ruza ol rusa! Kiel oni nomas la diversajn ĉapitrojn de la Ekzercaro?

J.W.: Para... paradukoj aŭ paraprincoj...

J.C.: Stulte! Paragrafoj oni nomas ilin.

J.W.: Nu, jes, iuj paramoŝtoj, sed mi ne estas kompetenta pri tiuj... tiuj aristokrataj titoloj.

J.R.: Vi vidas. Tia estas tiu nova generacio. Miloŝ estas ankoraŭ etulo, sed Nikodemo povas honti - esti tia stultulo. Oni ne povas miri, se ĉiuj instruistoj estas pro nerva elĉerpiĝo frenezaj.

L.V.: Onklino Fanjo, mi ankaŭ freneziĝos. Mi freneziĝos pro tiu aĉa vesp-ero. Ho ve, ĝi tiom doloras!

F.F.: Ĉu vespero vin doloras? Kion vi babilas?

L.V.: Ne ĝuste vespero, sed la loko, kie min vespo pikis. Kaj ĝia ero restis en la vundo.

0-0-0

F.F.: Verŝajne vin interesas, kion signifas tiu ĉi kadro (ĝuste starigata). Ĝi signifas disbatitan spegulon. La nun prezentota dialogo havas la saman nomon.

M.L. kaj H.B.: **Disbatita spegulo.**

J.C.: Jen vi vidis, kiel ruzete inventemaj estas tiuj virinoj.

J.R.: Vi parolas, kvazaŭ vi, viroj, estus anĝeloj. Kaj dume...

J.N.: Ne batu, lasu lin! Nun ja estas en la programo tri anekdotoj.

J.R.: Jes. - Alkuris Joĉjo al sia patrino kaj kriis: „Panjo, mi ĵus englutis pinglon!" Panjo respondis kvietige: „Ne gravas, Joĉjo, mi aĉetos novan.“

J.N.: Unu dimanĉan posttagmezon struta familio iris vizite al siaj konatoj. Sed ili ne volis esti ĝenataj, tial ĉiuj membroj de la familio ŝovis sian kapon en sablon. Kiam la struta familio alvenis kaj ne vidis la kapojn de siaj konatoj, diris la plej aĝa struto: „Ni ja povis antaŭvidi, ke ili hodiaŭ ne estas hejme!“

J.C.: Foje mi vidis viron, kiu kondutis tre okulfrape. Li tiel strange kaj nenature tenis sian brakon... tiel, nu rigardu! Al ĉiu preteriranto li ĝenis. Li puŝis plurajn homojn kaj poste, ho teruro, li klopodis eniri la tramon numero naŭ. La pordo apenaŭ sufiĉis por li kaj lia kurbigita brako. Homoj lin insultis kaj minacis, sed li ĉiun ignoris. Post li premiĝis pluaj homoj, sed lia braka arko estis necedebla. Nu, tiel, rigardu! Ŝajnis, ke okazos iu masakro. Sed hazarde la stranga viro rigardis al sia brako kaj subite elkriis: „Kiu ŝtelis mian melonon?"

M.L.: Per tiu ĉi epizodo finiĝis la drola parto de nia aprila programo. Antaŭ ol ni disiros, ni iom por vi kantas, ĉar en la tuta mondo feliĉaj homoj kantas. En la kantado aperas homa humoro, temperamento, ankaŭ doloro kaj sentoj. En la kantoj ili esprimas sin sincere. Kiom da kantoj kreis nia popolo! Kaj kiom da popolaj kantoj ekzistas en la tuta mondo. Ĉie homon akompanas kantoj.

Kaj el tiu amaso ni por vi elektis kelkajn. Ni provos ilin kanti en la originala lingvo. Certe ni ne sukcesos esprimi la karakteron de la koncernaj popoloj same kiel la indiĝenoj kantantaj siajn melodiojn kaj ritmojn. Tamen ni montros al vi ereton el la tutmonda kanta riĉaĵo.

1. Por la unua kanto ni vojaĝos al Jugoslavio. En la slovena kanto, kiun vi aŭdos, plendas junulo pri tio, ke lia karulino iom malatentas lin kaj zorgas pri la aliaj. Sed lia doloro verŝajne ne estas tiom akuta, ĉar li tuj konsolas sin per tio, ke lia amatino donos al li bukedon, kiun ŝi dum la promeno kolektos en la ĝardeno. La esperantan tradukon prizorgis J. Cink.

Zvedel sem nekaj novega
od svojga dekleta zaljubljenja
do ona si sbira drugega
in za me ne mara nič več.
Oj tiho leti golubica
da tega ne zvejo mamica
da tega ne zvejo drugi ljudje
da ti si za moje srce.
Po vrtu je špencilala
rožce si v pušeljc nabirala
rozenkrant, nagelček, rozmarin
iz tega si pušeljc neradim.

Malbonan novaĵon eksciis mi,
ne estas fidela knabin' al mi,
aliaj junuloj allogas ŝin,
ŝi koni ne volas plu min.
Ho, flugu senbrue, kolombinet',
jen estas deziro kaj mia pet',
ke nek iuj homoj nek la patrin'
eksciu, ke amas mi vin.
Mi vidis ŝin foje, ke dum promen'
la florojn kolektis ŝi en ĝarden',
diant', rozmaren' verda kaj rozet'
por mi estos en la buked'.

2. El Jugoslavio ni flugos okcidenten, trans Alpoj, al Francio, kie ni trovis nian duan kanton. La kanto ankaŭ temas pri plendoj de amanta junulo, al kiu baras montoj vidi la domon de lia kara. Eĉ kanto de alaŭdo ne ĝojigas lin. La kanton li sendas al la amatina orelo. Li kredas, ke la montoj

plenumos lian peton kaj malaltiĝos, por ke li vidu ĝis tie, kien li sendas la kantantan alaŭdeton.

La tradukon al Esperanto faris J. Cink.

Dessous ma fenetre

Sub mia fenestro najtingala kant'
sonas tutan nokton por mi - maldormant'.

Refreno:

La kanto birdeta ne koncernas min,
estas ĝi por mia fora amatin'.

Post montoj altegaj ĝis la firmament'
kaŝas sin de mia amatin' tegment'.

Montaroj, kliniĝu, levu vin, eben',
por ke domon karan vidu mi sen ĝen'.

Kompleze montaroj vere klinis sin,
lasis mian vidon al la amatin'

3. Por la tria kanto ni vojaĝos ankoraŭ pli okcidenten, al hispania provinco Asturio, kie kantas denove junulo. Lia amo apartenas al la patrujo kaj al junulino, por kiu li ŝiros floron por memoro. La traduko devenas de E. Tudela Flores, adaptita ĝi estis de J. Cink.

Asturjas patria kerida
Asturjas de mis amores
kjen estu vjeva en Asturjas
en algunas okazjones.
Tengo ke subir al arbol
tengo ke kocher la flor
i darse la mi morena
|:ke la pongaen el balkon :|
ke la deche de vaner..
Tengo ke subir al arbol
juna flore de kocher.
Asturjas patria kerida
Asturjas de mis amores
kjen estu vjeva en Asturjas
en algunas okazjones.

Asturias, kara patruja land',
Asturias de miaj amoj,
jen kiuj estis en Asturias
dum la diversaj iamoj.
Devas mi grimpi sur arbon,
kie plej belas la flor',
ĝin mi deŝiros kaj donos
al amatin' por memor'.
Ŝi en balkonon ĝin metos
aŭ kaŝos ĝin en sekret',
certe mi grimpos sur arbon
por la plej bela floret'.

4. Kaj por la plua kanto ni flugos al Ameriko, al Usono, kie tute specialan karakteron al siaj kantoj donas la negroj. Belegaj pro sia sincereco estas kantoj de tiuj, kiuj tiom suferis pro sia rasa aparteno. En siajn kantojn ili metis ĉiun sian triston kaj nostalgion. En la kanto „Virginio“ maljuna negro konfesas la amon al la lando, kie li naskiĝis, malgraŭ tio, ke li devis tie peze labori kaj multon elsuferi de sia blanka Mastro.

Carry me bach to old Virginny...

5. La lastan kanton ni ĉerpas el la granda riĉaĵo de popolaj kantoj en Meksikio. Ĝia melodio kaj ritmo estas vere sugestia, post ĝia kantado la melodio ankoraŭ longe sonos al ni en la menso. Kantu kaj ne plendu, diras en ĝi junulo al sia kara belulino, ĉar per kantado konsoliĝas la koro. Tradukis J. Cink.

De la Sierra Morena,
cielito lindo,
vienen bajando,
un par de ojitos negros,
cielito lindo, de contrabando.
Ay, ay, ay, ay! Canta y no llores
cielito lindo, los corazones.

De la Sierra Morena
venas knabino nigrookula,
estas vere ĉarmega,
amas ŝin mia koro junula.
Ekkantu nun sen la doloro,
ĉar per kantado, ho mia amo,
ja konsoliĝas la koro.
Ho karulin' mia, sagojn elpafis al mi
jen la Amoro. Ludis li nur, sed trafis
min, faris vundon en mia koro.